



OMOTO

INTERNACIA

Monata organo de la UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Sidejo : 49, rue Boulard, PARIS (14^e) Telegrafa adreso : EUROPOMOTO-PARIS

**Homo estas infano
de Dio kaj Lia viv-
anta templo.**

Majstro DEGUĈI.

Jarabono por Francujo : 10 fr. fr.

Redaktoro : K. NIŠIMURA

Jarabono por aliaj landoj : 3 sv. f.

Poŝtmandatoj devas esti sendataj al la persona nomo de la redaktoro.

La Mondo de Hierau kontraŭ la Mondo de Morgau

Se vi foliumas la historion de la grandaj ideoj movadoj, vi konstatos, ke ili ĉiuj estis aŭ oficiale malaprobataj, aŭ eĉ persekutataj dum ilia embria periodo. Sengloraj estis la komenco de ĉiu nova religio, kaj mokata estis ĉiu nova reformisto. Ĉiuj "misiistoj" (Mesioj aŭ senditoj de Dio) estis blasfemataj de iliaj samlandanoj dum ilia tera vivo, kaj de tie la proverbo : "neniu povas esti profeto en sia propra lando". La popolamasoj plej ofte mortigadis siajn gvidantojn kaj poste starigis al ili monumentojn : Kristo, Luther, Baha Ullah, Jaurès...

Depost kelkaj dekjaraj ia nova fermentado de l'ideoj estas sentata tra la tuta mondo. De Kalifornio, tra Eŭropo kaj Azio, ĝis la flava Insullando -- iaj novaj kulturfortoj revekiĝas kaj popoloj, lacaj pro bataloj, levas pie la okulojn al ĉielo por peti novajn idealojn kaj novajn profetojn. De Kalifornio ĝis la flava Insullando societoj de serĉantoj kreskas kiel fungoj.

Tio estas la "Mondo de Morgau".

Oni malklare antaŭsentas la alvenon de iu, kiu devas montri la novan vojon al la homaro kaj alporti novajn idealojn al la popoloj.

Kaj, se vi ankoraŭ renkontas homojn fidelajn al iliaj stultaj tradicioj de batalo kaj mortigo -- sciu ke tio ĉi estas atavismo, kiu nelonge dauros. Ĉiuj ĉi homoj estas la reprezentantoj de la mallumaj fortoj, kiuj provas kaj fortikiĝas la potencon de la novaj religioj.

Jen homoj, kiuj vivas per eluzitaj idealoj kaj remaçadas la pensojn de siaj geavoj. Ili serĉas la okazon kontraŭbatali kaj eĉ persekuti la idealemajn apostolojn de la novinstruoj. Kaj kredas al neniu nuntempa profeto nek obeas iun morallegon.

Tio estas la Mondo de Hierau.

Du mondoj batalas unu kontraŭ la alia : la Mondo de Hierau kaj la Mondo de Morgau.

Kaj tio ĉi ne estas batalo per glavoj aŭ per kanonoj, sed batalo per ideoj kaj principoj.

Du konceptoj luktas sur la tero. La unua havas malantaŭ si la agogon de jarcentoj kaj jarcentoj, la sperton de la tuta historio, la kunhelpon de siaj avoj kaj praaŭoj.

La dua havas nenies apogon malantaŭ si. Ĝi apenaŭ naskiĝis kaj nek sperto nek tradicio ĝin subtenas. Sed ĝi havas antaŭ si -- la tutan estontecon, kiu estas la garantio por ĝia triumfo.

La Mondo de Hierau devas subiri ĉar nova suno leviĝos, kaj la tondroj de la militoj anoncas ĝian agonion.

Kaj kiam la Mondo de Morgau estos triumf-

Mahatma Gandhi kaj Onisabro Deguĉi

(Traduko el la japana Omoto-jurnalo, Kamino-Kuni)

Datigo. (Vidu Omoton Internacian, N° 10)


1. Mahatma Mahandas Karamchand Gandhi naskiĝis en Borbandal (Nord-Okcidenta Hindujo) la 2-an de oktobro 1868 kaj apartenas al raso ardo plena kaj aktiva, sed dividita en multaj partoj pro internaj bataloj, raso tamen tre praktika kaj komercema, kiu interrilatis kun la gentoj eĉ ĝis Zanzibar.

La vizaĝo de Gandhi estas gentila, milda kun tre nigraj, grandaj elstarantaj okuloj. Lia korpo estas malgranda, lia vizaĝo malgrasa kaj sulka. Sur sia kapo li portas malgrandan ĉapelon, kovras sian korpon per tre modesta blanka vestaĵo kaj marŝas piednude laŭ la kutimoj de sia lando. Li manĝas nur rizon kaj fruktojn, sed neniam viandon; trinkas nur akvon, dormas tre malmulte (ordinare sur la planko) kaj konstante laboras. Lia aspekto havas nenian originalan trajton kaj sur lia vizaĝo oni rimarkas nenion alian ol la senlima toleremo kaj senfina amo.

2. Deguĉi naskiĝis en malgranda vilaĝo proksima de Kioto, en la centra parto de Japanujo la 12-an de julio 1871. Ĝis nun li senlace kaj sindone laboris per plumo kaj vorto por plibonigi la situacion de la homa gento kaj batalis kontraŭ la socia dekadenco kiel majesta roko kontraŭ furiozaj marodegoj. Li gvidas la homan penson al la vero kaj direktas la popolojn en la vojo de la homaranismo; estras la japanan novspiritan movadon kaj donis la fundamenton de nova religio, kreis ligan de religioj kaj Universalan Honaman Asocion. Lia vizaĝo estas ankaŭ milda kaj linj okuloj -- amoplenaj, penetremaj, inspirantaj

volontan obeon. Kompare al figuro de Gandhi, la korpo de Majstro Deguĉi estas pli dika, kaj alta 1,65 m. Lia vizaĝo brilas kiel polurita kaj havas nenian sulkon. Liaj kapoj kovras longaj haroj falantaj sur la dorson, sed ne ĉapelo. Li vestiĝas per kotona modesta vestaĵo kaj nur dum diservoj portas belan ceremonian veston el silko. Li ankaŭ manĝas nur vegetaĵojn aŭ fiŝojn kaj trinkas nur teon. Majstro Deguĉi estas multoble genia : li tre bone skribas la mandarenan lingvon kaj tre lerte desegnas : liaj verkoj havas grandan literaturan kaj poezian valoron. Li estas naskita kun emblemo de Orion-stelaro sur la dorso, kun krucsignoj sur la manoj kaj kun nerondaj linietoj sur la fingroj. Laŭ principo li malaprobas la kontraŭbatalon kaj toleras pacience ĉiujn atakojn kaj persekutojn. Li estas enkorpiĝo de multobla amo kaj per la potenco de sia spirito humiligas ĉiujn siajn malamikojn, kiuj fine amikiĝas kun li.

Trad. K. N.



JAPANA ESPERANTISTA KONGRESO

(Vidu en la lasta numero)

× S-ro Sengucu Deguĉi, prezidanto de U. H. A., en nacia kostumo

anta, la Mondo de Hierau rekonas en ĝi sian indan infanon, pripentos siajn pekojn, donacos sian miljaran sperton al la Mondo de Morgau kaj benos ĝin.

Malnova kaukaza rakonto ilustras mian penson.

Taras Bulba, forta kaj sana vilaĝano, sendis siajn filojn por studi en la urbo. Reveninte, ili estis surprizitaj, ĉar la patro renkontis ilin ne kun kiso, sed kun bokso. Tamen la filo ne ektimis, kaj boksvenkis sian patron. Tiam la patro sincere ekĝojis, ĉirkaŭprenis lin kaj estis kontenta havi filon fortan kaj kuragan.

La Mondo de Hierau estos feliĉa, kiam la Mondo de Morgau venkos ĝin !

LOHEN GRIN.

Al niaj Amikoj

Ni havas la plezuron komuniki al niaj estimataj gelegantoj, ke kun tiu-ĉi numero Oomoto Internacia finas sian unuan jaron. Por la regula aperado, nia organo bezonas la moralan kaj finanĉan subtenon de la legantoj. Taskante ĉiam perfektigi kaj plibonigi la gazeton, ni tre ŝatos la konsilojn aŭ eĉ la kritikojn de niaj abonantoj.

Estimataj Gelegantoj, ne forgesu la noblan ideon al kiu nia gazeto estas dediĉita kaj la malfacilan taskon, kiun ĝi volas plezumi. Do, ne prokrastu ĝin reaboni kaj ĝin rekomendi al viaj konatuloj.

La januara numero de "Oomoto Internacia" aperos en ok paĝoj. Dum la venonta jaro ni publikigos interalie gravajn verkojn de Majstro Deguĉi, artikolon de Henry de Jouvenel pri azia ligo de nacioj, tradukaĵojn el Beaudelaire, Rimbaud, Gérard de Nerval, Nikolaj Rajnov, Oswald Spengler, Gustave Le Bon, k. a., kaj volonte akceptos la kunlaboradon de niaj ĉerĉemaj samideanoj.

AKTUALAĴOJ

Brita Imperia Konferenco. — Sub tiu ĉi titolo la franca revuo «Europe Nouvelle» (Nova Eŭropo) komentarias la rezoluciojn de la Imperia Konferenco de la britaj koloniaj ŝtatoj, kiu ĵus finis siajn laborojn. Efektive, oni ĝis nun ne sciis, ke la diversaj partoj de la Imperio estas «sendependaj komunumoj interne de la brita Imperio, egalrajtaj membroj kaj neniel submetitaj unu sub alia rilate al iliaj hejmaj aŭ eksteraj aferoj», kio signifas, ke Aŭstralio aŭ Kanado povas subskribi privatajn kontraktojn kun Usono kaj samtempe Anglujo — kun Japanujo. Oni ankaŭ ne sciis, ke ĉe eventuala eŭropa milito Irlando estas libera aliiĝi al la malamikoj de Anglujo!

Tamen, malgraŭ ĉiuj ĉi decidoj, en Anglujo, oni ne

timas la disfalon de la granda Imperio, «ĉar la koloniaj ŝtatoj ankoraŭ longe bezonas la fortan finanĉan organizon de Anglujo kaj ĝian potencon siparon por ilia sendanĝero».

«Anglujo rekonkiris siajn koloniojn ilin emancipinte».

La Konferenco do rekonis la rajton al Aŭstralio kaj Kanado sin ligi kun Ameriko kaj al Anglujo — ligigi kun Eŭropo en Lokarno. Do, brita ligo de nacioj elkreskis inter la malnova kaj la nova mondo, kvazaŭ Atlantido reaperis el sub la akvoj por unuigi ambaŭ civilizaciojn, por kolekti la riĉaĵojn de du mondoj, organizi la transportservon, koncentrigi la bankojn, kaj, laŭ la vortoj de Henri de Jouvenel, «prepari la imperialismon de la pund-sterlingo».

La Imperia Konferenco enterigis la rajton de malsankcio, kaj rifuzis [por granda surprizo de «Daily Telegraph»] la jurdikton de la internacia Haga Tribunalulo.

Ĉu tiu ĉi nova statuto malfaciligos la rolon de Anglujo en internacia politiko, kiel opiniis gazeto «Izvestija»?

En Eŭropo certe ne. Kontraŭe.

S-ro Chamberlain ofte suferis pro speco de paralizo en la Ligo de Nacioj devante sin konformi al la kontrolo de la koloniaj ŝtatoj rilate al lia eŭropa politiko. De nun la interveno de Anglujo en la eŭropaj aferoj estas pli facila.

La situacio en Azio estas tamen iom pli alia; precipe post la malsukceso en Ĉinlando. En Hindujo la situacio ne plu estas la sama kiel antaŭ sesdek jaroj, kaj okaze de la konferencaj rezolucioj, la hinda ĵurnalo «New India» aperanta en Madras, skribas inter alie: «En la estonteco Hindujo estos unu submetito de ses mastrinoj».

Efektive, post la imperia konferenco, Hindujo restis la plej malkontenta.

La sovjetoj ĝin rigardas kun rideto.

Enkonduko de latina alfabeto en Turkujo. —

Laŭ sciigo el Konstantinopolo la registaro de la turka respubliko decidis anstataŭi la araban alfabeton per la latina en la skriba kaj la presa turka lingvo.

La konsideroj, kiuj instigis la registaron tion entrepreni, sin bazas sur la fakto, ke la korana alfabeto havas alian fonetikan karakteron ol la araba. Por noti la turkan fonetikon per arabaj literoj, oni jam devis enkonduki multajn novajn signojn kaj punktojn, kio tro komplikis la alfabeton. Krome, la araba skribo, kiu havas senduban estetikan valoron, ne estas praktike utiligebla. Ĝi postulas longan studadon. Por ko-

rekte skribi, la arabaj infanoj devas lerni multajn jarojn. Tio klarigas la mankon de klereco de la popoloj, kiuj uzas la araban alfabeton, inter kiuj nur maloftaj feliĉuloj estas instruitaj.

Jen estas fakto, kiu meritas esti citata al malamikoj de Esperanto.

La Internacia Ekonomia Konferenco. — La komitato elektita por prepari la Internacian Ekonomian Konferencon, dum sia dua kunsido en Genèvo, ellaboris la tagordon de la konferenco, kiu kunvenos dum venonta majo. Tiu konferenco sin okupos pri la ĝenerala ekonomia situacio de la mondo, pri la kaŭzoj, kiuj rompis la internacian komercan kaj industrian ekvilibron kaj pri la rimedoj aplikeblaj kontraŭ novaj internaciaj komplikaj. Pli speciale la tagordo proponas pridiskuton de tre gravaj komercaj, industriaj kaj agrikulturaj demandoj: libereco de la komercio, dogan-impostoj, organizo de la produktado, nuntempaj malhelpoj por la industrio, regula intersaĝo de agrikulturaj produktaj, internacia industria kunlaboro, k. t. p.

Efektive, la milito kreis grandan ekonomian maldordon en la mondo kaj la ventrego de la homaro estas danĝere malsana. Sed ĝia ĉerbo estas multe pli malsana kaj kuraci ĝin estas ankaŭ tre urga afero, kiel kuraci ĝian ventron.

Datreveno de la Locarn'a Konferenco. — Jam unu jaro pasis depost kiam oni distrumpetis la alvenon de homfeliĉo sur la tero. Depost unu jaro, ni atendas ĝin kun haltiga spiro. Ĉu la situacio efektive plibonigis?... Ni esperu almenaŭ.

La bilanco ne estas tamen tre kuraĝiga. Tute aprobante la Locarn'an verkon (kiu laŭ la vortoj de S-ro Briand en la Senato, «ĉe se ne utilas tamen ne malutilas») ni ne povas ne konstati la internaciajn komplikajn okazintaĵojn dum la ĵuspasinta «pacjaro». Se vi ŝtopas unu truon, mil novaj ekfaŭkas, se vi fortranĉas unu kapon de la drako mil novaj ekkreskos: Tanger, Brazilujo, Ĉinlando, Balkanaj aferoj...

Ni jam skribis en «Oomoto» ke vortoj kaj paperoj ne elgvidis nin el la magiita rondo. Neniu povas antaŭdiri la intencojn de la malbonulo. Nur per la radikala reeduko de la popoloj sur la bazo de la spiritualeismo ni povas sukcesi paralizi tiujn intencojn.

Homo estas fundamento de la ĉielregno.

Sen Dio nenio sukcesas.

La Reveno de Kristo al Jerusalemo

(de Majstro O. DEGUĜI)

(7) El la Rakontoj de Spirita Mondo

V

SANKTA GRUPO

(1633-a ĉapitro de la Rakontoj el la Spirita Mondo)

(Daŭrigo.)

Dio amoplena ekincentis, jam de post kreo de la Universo, la profundan projekton, venigi al la mondo, feliĉan sian regnon kaj doni benon kaj ĝojon al la homaro. Nun Li Sin manifestis en Hinode-Insullando. Kaj por prepari Jerusalemon — sian Sanktan originan lokon — por Sia malsuprenveno al tie ĉi, la Granda Dio sendis la sanktulon de Mizuspirito kiel Elaĉetanton de homaraj penoj ĉiujspesaj. Estas ĝoja kaj esperplena la fakto, ke izraelidoj, popolo dielektita, kolektas ĉiunacianojn kaj iniciatas konstrui, sub la kredo al revenonta Mesio, tian solenan templon, kiel la templo de via Amerika Grupo. Granda estus mia honoro, se vi bonvolus min akcepti en via sankta grupo.

Ah! Kannagara Tamaĉihaemaese.

Li deiris gaje de la tribunudo dum entuziasma aplaŭdo de ĉiuj ĉeestantoj.

Tuj lin sekvante, la maljuna sinjoro alizis la tablon kaj diris:

— Laŭ la parolado de lia misiista Moŝto, mi bone komprenis por kiu celo li alveturis tien ĉi kaj mi opinias, ke miaj samgrupanoj ankaŭ komprenis. Evidente, estas profunda kaj tuta-monda Dia entrepreno la fakto, ke ambaŭ ge-savantoj direktataj de la spiritoj Mizu kaj Izu, nun aperis en Hinode-lando, kiu estas plene unuigita jam depost kvindek jaroj. Antaŭe ĝi estis dividita en centoj da ŝtatoj, kiuj ofte militis reciproke. La unuigo de tiu lando kaŭzis ĝian nunan progreson, kio montras, ke multe pligrandigos kaj plinobligos la nuna mond-civilizo kaj ke la homaro multe prosperos, se la popoloj amikiĝos. Prave diras Sinjoro Vravasa, ke la grado de l'interpopola amo estas mezurilo por la homa progreso. Por venigi la mondpacon t. e. efektiviĝi la Diregnon sur la tero, ni devas unue labori por la disfalo de l'«obstinaj baroj», kiuj dividas la naciojn. Nur revante kaj songante, ni ne povas realigi la pacon sen vigla klopodo por disfaliĝi la murojn, samkiel ne estas eble unuigi la akvon de du ŝtoplutitaj boteloj sen ilin rompi. Nia grupo penas montri al la mondo la veran vojon al la paco. Kaj por tio ni preparas la revenon de Mesio. Dank'al la alveturo de la sankta misiisto el Hinode-lando, mi eksciis pri la grandega entrepreno de Dio. Kaj mi, esperas, ke vi, miaj samgrupanoj, eklaboros kune kun tiu ĉi sanktulo por sukcesigi la dientreprenon — la unuan kaj la lastan.

La maljuna sinjoro finis sian paroladon, aplaŭdite de la ĉeestantoj; atmosfero de harmonio estis sentata regi en la tuta salono.

Tiam Mario el Magdala, ĝis nun servorta

pro granda emocio, starigis majeste kaj aliris la tribunon:

— Estimataj gesinjoroj,

Mia animo tre entuziasmiĝis, kiam mi aŭdis la parolojn de ambaŭ sanktuloj. Estas miraklo mia hazarda renkonto, apud la Jerusalema stacidomo, kun sinjoro Vravasa, kiu alvenis tien ĉi de trans malproksima oceano. Mi ne dubas, ke li estas sendita laŭ ordono dia, kiel antaŭiranto de Mesio revenonta. Kun granda plezuro mi partoprenas vian kunvenon je honoro de lia alveturo. La malsamaj vortoj: «Reveno de Mesio», «Reapero de Kristo», «Efektiviĝo de Miroku-Diregno» (1) havas la saman signifon. Ne sufiĉas nur diri, ke proksima estas la tago, kiam la plano de Dio estos realaĵo; la homoj, kiuj estas diaj vivantaj temploj, devas vigne agi por helpi Lian entreprenon. Ni, filoj de Dio kaj vivantaj Liaj temploj, devas batali kontraŭ du fortikaj malhelpoj: la unua estas ekstera, monda, materia, la dua — interna, morala, spirita. Du muroj, kiuj baras nin de Dio: unue, la militarismo kaj la ekskluziva nacismo; due, religia kaj rasa malamikeco. Forigi la religiajn murojn estas laŭ mi afero pli urĝa kaj pli grava. Efektive ĉiuj religioj instruis pri la samaj principoj. Kristo proklamis: «La ĉielregno ja troviĝas en vi mem»; Abdul Baha instruis: «La mondpacon devas esti realigita en la homa koro».

(Daŭrigota.)

(1) La vorto «Miroku» venas el budhistaj Sanktaj Skriboj kaj signifas: «Granda Dio de la Amo».

KOOGEGU NIŠIMURA
Direktoro de Eŭropo
Propagandoficejo en Parizo

Mia propagandvojaĝo en Ĉeĥoslovakujo

Apenaŭ pasis du semajnoj depost mia reveno el mia nordgermana propagandvojaĝo kaj la saman tagon (kiam okazis la edziĝfesto de mia kunlaboranto Jozefo Major kun samideanino Cecilia Sampson, kiun mi ankoraŭ povis ĉeesti) mi ree ekveturis sur la grandaj vojoj de Eŭropo kaj rapide alproksimiĝis Ĉeĥoslovakujon, pasante tra Germanujo. Unue mi volis viziti la faman urbon Nürnberg, kiu ja estas konata ĉie en Esperantistaj rondoj pro la tie okazinta Kongreso. Nur mallongan tempon mi pasigis tie, ĉar rapidis prepari mian unuan paroladon, kiu estus devinta okazi en Eger. Bedaŭrinde tiu ĉi projektita parolado ne povis okazi. Perdinte kvar tagojn en tiu ĉi loko — kies beleco cetero rekomencis min por la tempoperdo — mi veturis al la fama ĉeka urbo Plzen. Mi renkontis en la stacidomo — kaj tute hazarde! — Sinjoron R. Fenzel. Tiu ĉi fervora Esperantisto bonvolis organizi mian unuan paroladon en Ĉeĥoslovakujo, la 16-an de septembro. Malgraŭ ke mi ne povis kunporti la anoncitajn lumbildojn, pli ol 120 personoj kolektiĝis kaj tute plenigis la ĉambregon. Tiu ĉi plenege kunsido memorigis al mi la paroladon okazintan en la nordgermana urbo Flensburg, pri kiu miaj legantoj jam estas informitaj. Dum miaj paroladoj en Ĉeĥoslovakujo mi konstatis, ke lumbildoj estas tute ne necesaj por sukcesigi Esperantan paroladon. Ankaŭ mi konvinkigis pri tio, ke en simila okazo invito de ĝenerala publiko estas nepre dezirinda. Kio estas nia celo? Ĉu konvinki la publikon pri la granda valoro de Esperanto en la internaciaj rilatoj aŭ ĉu ni nur devas kontentiĝi kun la ripeto de la neŝanĝeblaj veraj antaŭ kelkaj jam konvinkitaj Esperantistoj?

Tie ĉi, samkiel en la ceteraj paroladoj mi konigis al la aŭskultantoj la ĝeneralajn pri Oomoto, mi paroladis pri mia patrujo, pri la malproksima Japanujo, kaj por apogi la diritaĵojn per imagoj, mi montris multajn kunportitajn poŝtkartojn kaj bildojn. Miaj paroladoj okazis en Esperanto kaj estis tradukitaj en germanan lingvon kaj kelkloke en ĉekan lingvon. Post la fermo de la granda pu-

blika parolado, okazis en apuda ĉambro speciala kunveno por Esperantistoj. Grupo de gajaj samideanoj babiladis kun mi ĝis noktomezo.

« Bona komenco valoras duonon de fina sukceso » — diras iu proverbo. Post tiu ĉi bonsukcesa unua parolado mi daŭrigis mian vojaĝon kun grandaj esperoj.

Mi instruis nun veturi al Grasslitz, sed oni rifuzis mian paroladon per depeŝo. Dank' al tio mi plizen la okazon viziti grandan bierfabrikejon en Plzen, kie oni brile gastigis min.

Karlsbad. Sekvis parolado en tiu ĉi fama banurbo. Du junaj knaboj, filoj de samideano instruisto, Hajek, renkontis min en la stacidomo, ĉar la patro estis retenita en la lernejo. Ni bone alvenis



Amika vespero en Reichenberg dum la propaganda vojaĝo de nia direktoro, S-ro Nišimura, en Ĉeĥoslovakujo.

en la antaŭurbon Maierhöfen al la hejmo de samideano Hajek. Baldaŭ okazis mia parolado en alia antaŭurbo: Fischerau, kie ĉirkaŭ 30 personoj kolektiĝis.

La 18-an de septembro mi jam estis en Preschen apud Dux. S-ro Löschner, direktoro de karbminejo, estis mia tre afabla gastiganto. Al lia inteligenta filneto mi enskribis japanan poemon en la memorlibreton. Jen estas ĝia traduko: « Bela floro vi estas nun, floranta sur kampo; baldaŭ vi fariĝos brila stelo en la mondo... » Mi estas tre dankema al S-ro Löschner por la tre agrabla ekskurso, kiun mi faris per lia aŭtomobilo.

Languegest. Jen mi troviĝas en tute malgranda vilaĝo, kies domoj estas artiste dismetitaj. Sinjoro

Schmiedl, instruisto, akceptis min kaj mi konatiĝis kun la kelkaj Esperantistoj, kiuj loĝas en tiu loko. Malgraŭ la malgrandeco de la vilaĝo 70 personoj ĉeestis mian paroladon. La ĉeestantoj estis sendube lacaj post la taga laboro. Miaj okuloj rimarkis carman fraŭlinon trankvile dormantan meze de la aŭskultantoj. Bonan nokton, eternaj dormantoj de la spirita mondo!

Teplitz-Schönau (19-an de IX). Tie ĉi publiko ne estis invitita pro manko de lumbildoj. Tamen 30 geesperantistoj kunvenis. En tiu ĉi urbo okazis al mi interesa aventuro. Mi renkontis sur la vojo germanan sinjoron, kiu ekparolante al mi, diris: « Ĉu vi estas Japano? » Kaj tuj li ekkantis japanan kanton kun bona japana elparolo. Li estis muzikisto studenta japanan kantarton. La kanto diras: « Post rendevuo kun la amatino mi promenadis en pina aleo. Falis roso de la arboj kaj larmoj el miaj okuloj... »

Komotau (21-an de IX). En tiu ĉi sufiĉe granda industria urbo estas nur malmultaj Esperantistoj. Sinjoro Schmiedl en la lasta minuto decidigis inviti la publikon. Mirinde pli ol 100 personoj ĉeestis mian paroladon.

Bodenbach (22-IX). Tetschen kaj Bodenbach estas najbar-urboj, dividataj de majeste fluinta rivero Elbe. La beleco de la loko estas rimarkinda. La Bodenbach'a flanko estas roka kaj kovrita de preskaŭ natura parko. Aliflanke vidiĝas la konturoj de historia kastelo. En Tetschen okazis kunveno, kie nur Esperantistoj ĉeestis.

La alian tagon samideano Hans Klinger akompanis min tra Bohema Svislando. Malgraŭ la malvarmo kaj la pluvo tiu promonado ĉian restos en mia memoro por la beleco de la pejzaĝo.

Bohema Kamnitz (24-IX). Sinjoro A. Ohme afable akceptis min kaj mi ree paroladis antaŭ ĉirkaŭ 40 kunvenintaj Esperantistoj.

Warnsdorf (25-IX). Samideano K. Nase, afabla kaj aktiva Esperantisto, bonvolis min gastigi. 150 personoj, plejparte neesperantistoj, ĉeestis mian paroladon. Ingeniero Scholtze venis el Reichenberg kaj Sinjoro Pontz venis el Gablontz por tiu ĉi okazo. La lasta faris busokcesan nacilingvan propagandparoladon.

La sekvantan tagon okazis tre agrabla ekskurso al monto, kie mi interkonatiĝis kun Sinjoro W. Ludwig, lerta skulptisto, kiu tiel bone sukcesis skulpti la buston de D-ro L. L. Zamenhof.

(Daŭrigota).

Japanaj statistikoj

La nombro de Japanoj: 76.988.379 (1918); viroj: 38.903.195; virinoj: 38.085.184. Nun pli ol 80 milionoj.

La grandaj tertremoj dum la lastaj 60 jaroj: 42. La fremduloj en Japanujo: 18.761 (1921): 1.449 angloj, 1.669 amerikanoj, 20 aŭstrianoj, 566 rusoj, 711 germanoj, 382 francoj, 51 svedoj, 20 norvegoj, 14 ĉeĥoj.

Japanaj kristanoj:	200.000.
Popolaj lernejoj (1920)	25.562
Lernejoj por blinduloj	74
Instruistaj lernejoj	121
Liceoj	965
Industriaj lernejoj	15.562
Universitatoj kaj kolegioj	63
Aliaj	1.903
Sumo	44.225

Du fremdlingvaj lernejoj kie oni instruas jenajn lingvojn: angla, franca, germana, rusa, itala, hispana, portugala, ĥina, mongola, siama, malaja, ĥinda kaj korejana.

Jurnaloj (tagaj): 200; en tute: 1.788.

PAC-PREĜO

Ĉio-Potenco en la spaco,
Atentu de la koro vokon!
Donu al Reĝo de la paco
Sur tero por eterne lokon!

Lasu ne regi sur la tero
Nun plue de malam' armiloj,
Gvidu nin for de la kolero
Al am' kun pacaj bataliloj!

Gvidu nin el la noktaj ombroj,
Al lumo de la tago klara,
Kaj tra terur' de milit' fondaĵoj
La hejmon ŝirnu al ni karan!

Al dividita la homaro
Nun venu Via Pac-Angelo
Por nin kolekti en frataro
Sub signo de la verda stelo.

V. ANDERSON.

Opinio de materialisto pri Oomoto

« Sinjoro redaktoro, Mi dankas vin pro la bonvola transsendo de Oomoto, kvankam mi ne estas aboninto. Mi opinias same kiel vi pri ĝeneralaj principoj koncerne al universala homamo, kvankam mi tute ne estas spiritisto

Mi kliniĝas al la teorio de evoluado, kaj kredas ke la animo estas materia, kuŝanta en la cerbo. Vi eble pensas, ke mi estas agnostikulo. Tute ne, sed profund-pensulo (?). Mi estas en koro filozofa kaj mi kredas, ke la Naturo estas Dio.

Mi ne estas bigota, mi kredas, ke via movado estas inda kaj utila. Ankaŭ mi deziras ĝian sukceson.

Dankante vin denove pro via bonvoleco, mi restas, kun respekto, Charles C. CLACK. »

Noto de la Redakcio. — Koncerne la leteron de S-ro Clack, ni memorigas al niaj legantoj, ke Oomoto estas spiritualista sed ne spiritista movado, kvankam ne kontraŭstarante la spiritismon.

Faru bonon pro bono.

Preĝu por la interna fluo de la vera Dio.

Primer Congreso de Asociación Universal de Amantes del Hombre

Kameoka (Japón), 18-IV-1926

El primer Congreso de nuestra A. U. A. H. ha tenido lugar en Kameoka, ciudad japonesa. Todas las organizaciones japonesas y también los Oomotoanos occidentales y miembros de A. U. A. H. estuvieron representados. El Sr. Uchimaru Deguchi, Jefe del Comité, abrió el Congreso haciendo una reseña sobre los últimos progresos de nuestro movimiento. Se leyó un telegrama de saludo de nuestra Oficina de Propaganda en París. La decisión más importante de este Primer Congreso de A. U. A. H. ha sido la adopción de nuevos Estatutos, que publicamos a continuación. La rúbrica insignia de A. U. A. H. es una estrella verde en un tondo blanco rodeado de una franja circular roja, que representa el sol. Después de un selecto banquete, el Sr. Onisabro Deguchi, Jefe del movimiento de Oomoto, pronunció un muy instructivo discurso. El Sr. O. Deguchi se constituyó Presidente de A. U. A. H.

ESTATUTOS DE LA ASOCIACIÓN UNIVERSAL DE AMANTES DEL HOMBRE adoptados en el 1º Congreso celebrado en Kameoka (Japón) el 18 Abril 1926

Objeto

A. U. A. H. tiene por objeto fraternizar a la Humanidad sobre la base del Humanismo. A. U. A. H. tiene, además, por objeto laborar por traer a la efectividad uno era de felicidad y regocijo para siempre; esto es, instaurar en la Tierra el reino de los cielos, desde tantos siglos ansiado y esperado en el Mundo. La Humanidad está compuesta de hermanos, y la unanimidad debe regir el mundo. La realización de este ideal es el más alto objeto de A. U. A. H. Las circunstancias de la vida en la época actual han empujado el corazón del hombre, y si se permite que este proceso continúe, sobrevendrá una catástrofe inevitable que dañará grandemente a la Humanidad. Por esta razón trabajamos resueltamente para derribar los muros que los egoísmos han levantado entre las naciones, las razas y las religiones. Sobre la base del Humanismo, debemos deshacer el actual caos y fundar sobre la Tierra un mundo más luminoso, más tranquilo y más feliz.

Reglas

El nombre de esta asociación es Asociación Universal de Amantes del Hombre. La Sede Central reside en Kameoka, ciudad japonesa. Según las necesidades se constituirán Sedes Filiales y Oficinas Locales en todo el mundo. La Asociación la dirige un Presidente. La oficina central japonesa está bajo el control de un comité elegido que cuida de la administración. Cada organización local está dirigida por un Jefe y un comité. En cada organización tendrá lugar una vez al año una Convención General, y tantas Juntas de Comité como sean necesarias.

Adhesión

La adhesión a la A. U. A. H. es libre y gratuita. Los miembros se obtienen de cotizaciones voluntarias de los miembros sostenedores.

Lengua

A. U. A. H. adopta el Esperanto como lengua auxiliar internacional. Todas las organizaciones locales son libres, y pueden adoptar estatutos especiales aprobados por el comité central.

Programa práctico

Para la realización de nuestro objeto se editará propaganda y se organizarán discursos. Se enviarán propagandistas. Los miembros de A. U. A. H. respetarán todas las creencias y opiniones sinceras, y trabajarán para la realización de nuestro programa por medio del amor y de la bondad.

Oficina española de A. U. A. H.

Direktoro: F. MIRALLES, Hellin.

Anglalingvaj Samideanoj!

Legu kaj disvastigu la propagandan broŝuron

What is Oomoto?

Adresu la mendojn: Ĝenerala Centra Propagandoficejo de Oomoto, 49, rue Boulard, Paris-14^e.

BIBLIOGRAFIO

En liu ĉi rubriko ni koniĉe raportas pri ĉiuj al ni po duekzemplere alsenditaj libroj. Verkoj en aliaj lingvoj estas ankaŭ akceptataj.

Die Weisse Fahne (La Blanka Standardo), n-roj 9, 10 kaj 11. Oficiala organo de la germana Novspira Societo, de Suŭ-Ordeno, de la Kristana-Mistikosocieto, de la germana societo por Spirit- kaj Vivrenovigo, de la Berlina Asocio por psikaj serĉadoj, de la Okcident-germana Okultista laborosocieto kaj de multaj spirit-scienciaj unuigoj, rondoj, loĝioj, ktp. Recenzo pri « Die Weisse Fahne » jam aperis en *Oomoto Internacia* (nº 10). Ni refoje atentigas pri tiu frata revuo kaj juĝas, ke estus utile menciigi kelkajn artikolojn de tre granda internacia valoro: « Pri la islama mistiko kaj la esenco de la Suŝismo », « La Ascendo en la Signo de Virgolino » (astrologia studaĵo), « Pri la reformmovado en la medicino », de D-ro Georg Zorner; « Biokemio kaj Vitaminoj », de D-ro V. Walck; « Pri la videbla mondo », de Majstro Eckhart; « De Eckhart ĝis Böhme », de D-ro Curt Böttger; « La misteroj de la vivo », de D-ro Emanuel Mayer, kaj la tre interesa artikolo de juna novspiritano: « La vojo al Paneŭropo », kiu pravas la idealon de la juna generacio en Germanujo; « Sugestio aŭ Memsugestio », « Ezoterika praktikado de la kabalistoj », « La Ascendo en la signo de Skorpio » (astrologio), k. a. Krome, nº 9 enhavas parton de la kongresparolado de Majstro Deguchi dum la 1-a kongreso de « U. H. A. » en Kameoka: « Homo kiel Templo de Dio », kaj en la nº 11 estas enpresita germanlingve la nova statuto de « U. H. A. », adoptita dum la kongreso en Kameoka. Do « Die Weisse Fahne » estas spirita kaj idea frato de *Oomoto Internacia* kaj ni varme ĝin rekomendas al ĉiuj niaj legantoj, kiu sentas soifon por supera spirita kulturo.

Aliaj eldonadoj de: « Neu-Geist » (Novspiritismo) ricevitaj en la redakcio: *Neugeist als Lebenskunst und Lebens-Wissenschaft* (Novspiritismo kiel arto kaj scienco de la vivo) de nia samideano K. O. Schmidt.

Von der Macht des Gemüts (Pri la potenco de la spirito) de Emanuel Kant, kun klarigoj de S-ro Schmidt.

Im Lande des Heiligen Kreuzes. Franziskuslegenden aus Brasilien, de Anni Geiger-Gog. Eldonita okaze de la morto de Sankta Francisko d'Assisi (3. oktobro 1926).

La Nova Tago. Internacia Bahai'-Esperanto-Gazeto, n-roj 2 kaj 3. Tre zorge redaktata en bona esperanta stilo. Enhavas tradukon de la parolado « Civilizo kaj Progreso », kiun Rabindranath Tagore faris la 10-an de septembro en Hamburgo; krome, interesajn tradukojn el la verkoj de Abdul-Baha: « Sekreto de Dia Civilizacio: Religio », « Evolucio », « Orientokcidenta Unuigo » kaj « Bahai' Skribaĵoj », de Charles M. Ramey, k. a. *Baha' U' llah kaj Lia Misio*, de D-ro John E. Esslemont. Publicigita de la Esperanto-Komitato de la Bahai-Movado, Hamburgo, 1926. Instrua biografio de la persa profeto, kiu donas ekzemplon de pura kaj forta idealismo kaj persisto malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj, ĉe persekutoj kaj martirado. Oni rekonas la grandajn ideojn laŭ la grandeco de la entuziasmo, kiujn ili vekas.

Das Wort (La Vorto). Organo de la Nov-Salem'Amikaro. Eltirajoj el la verkoj de Jakob Lorber (pri la naturo de Jesuo). *Die Gottesbotschaft Jakob Lorbbers*, « Das Wesen Gottes », *Der Fall Luzifers*, « Der Laodizenerbrief des Apostels Paulus », de Jakob Lorber. « The Essence of the Eternal », de Jakob Lorber.

Die Geistige Urschöpfung, de Walter Lutz, 1924-1925. Gvidlibroj tra la verkoj de Jakob Lorber.

Il Veltro e « Luce », revista dediĉata alla Rivelazione, allo studio e alla diffusione di Verità trascendentali, Citta della Pieve, septembro kaj oktobro 1926; revuo por revelacioj, por studo kaj disvastigo de la transcendentaj veroj (itallingva).

La Alta Kanto de la Amo. Originala poemo de Teo Jung, premita per la Natura Floro ĉe la XII-aj Internaciaj Floraj Ludoj, 1926; eld. « Heroldo de Esperanto », Horrem b. Köln (Germanujo). Laŭdinda verko, montranta la poetan talenton de l'aŭtoro kaj refero pruvanta ke Esperanto ne estas nur lingvo de filatelistoj. Kio pli natura, pli melodia kaj pli flua, ol la versoj:

Poste, ĝis la landa limo,
Sür rapidaj ras-ĉevaloj,
Vin kondukos tutsekure
Kavalkado da vasaloj!

Biblioteko tutmonda:

Nº 1, *Mateo Falcone* kaj aliaj rakontoj de Prosper Mérimée. Nº 2-4, *La malgranda Johano*, de Frederik van Eeden. Nº 5-6, *La Arto de Memdisciplino-Psikagogio*, de Charles Baudouin. Verkoj eldonitaj de Rudolf Mosse-eldonejo, Berlino, 1926.

Esperanto de U. E. A. (oktobro) plendas por « gazet-fonda febro, kiu enpenetris ĉe la aziaj samideanoj », anstataŭ kuraĝigi ilin. Se novaj gazetoj naskiĝas en Oriento, tio ĉi montras nur la kreskantan esp. movadon en tiu lando, dank' al la vigla laboro de la aziaj esperantistoj — laboro nur laŭdinda kaj ne mokinda!

LOHEN GRIN.

LETERKESTO

Kiel pruvo ke Oomoto vekas intereson de la publiko, ni presigas kelkajn el la multnombraj leteroj senditaj al ni de niaj legantoj.

Karegaj Samideanoj,

Dum perdita momento, ne havante inkon, mi rapidas respondi al vi senprokraste, por ne lasi vin tro longe atendi.

Danke mi ricevis la grandan paketon de via bela gazeto. Estas vera, ke vi bonvole oferis pagi la post-espezojn, sed por frata kaj plue tre simpatia entrepreno kiel la via, nia koro nin devigas esti tiel sparema kiel ĝi rilatus nian propran monujon.

Vi pagos nenion por la perpoŝta forsendo. Ni ne aldonos ilin kiel subita torrento kun niaj gazetoj kaj regule uzos ilin por suplemento en niaj sendaĵoj al seriozaj kaj esperigantaj personoj. Jam multaj foriris kaj ni daŭrigos ilian forsendon plej lerte ĝis fina racia elcerpo de l' tuta kvanto.

Pluaj sendaĵoj de via flanko ni uzos sammaniere. Mi persone volas aliĝi al via movado je la honoro de l' homaranismo. Mi estas liberpensulo, sed mi intencas tuj verki plenan broŝuron holandlingvan por disvastigi Bahaismon kaj Oomotismion inter miaj samlandanoj kun ilia ĉiama religia disputado. Mi sentas kiel kulturodevo unuaranga ilin gvidi sur pli idealajn vojojn.

Mi pagos mian kotizon per tia viva laboro, sed volonte ricevos ne nur vian nunan signeton, sed se eble ankaŭ la antaŭan, ĉar mi havas specialan kolektaĵon de signetoj ĉirkaŭ enkadrigita diplomo kiun mi uzadas por propagando dum ekspozicioj kaj paroladoj.

Mi klopodos alporti inter la popolo ion pli bonan ol ilia disiritita, fusita kaj dogmumita kristanismo kaj montros la puran altruismon de l' sinsekvaj enkarnejoj de Mesio en Persujo kaj nun ree en Nipponlando. Mia profunda interna konvinko estas, ke la nuna en mil diversaj direktoj serĉanta homaro feliĉigos per la principoj de ambaŭ profetoj. Tuj post apero de mia broŝuro mi sendos ekzemplon al via oficejo.

Se vi juĝos tiun deklaron de la « holanda pioniro » sufiĉe gravan por publikigo en via gazeto, des pli bone,

Kun varma manpremo,

DREVES UITTERDIJK,
Centra Konsulo kaj redaktoro.

Mendu senpagaĵon specimenaĵon de Oomoto Internacia

Senpage

ni sendas al ĉiu petanto specimenan numeron de nia semajna, grandformata, neŭtrala ĵurnalo

Heroldo de Esperanto

Skribu al la Administracio en Horrem bei Köln (Germanujo)

Le Gérant: HENRI SELVES

Oomoto-Presejo Esperantista (V. Polgar), 33, rue Lacépède, Paris, V^e

